

Amo
per
Proverboj

Arthur
Azevedo



Saluton!

Jen plia libro eldonita de Kultura Centro de Esperanto por "Projekto Kelter". Tiu projekto, nomita laŭ la eldonisto de la unua esperanta libro, intencas eldoni elektronike librojn kies kopirajto ne plu validas aŭ librojn kies libera distribuado estas permesata de la aŭtoro.

Ni volas ĉi-foje danki la helpon de samideano **Fernando Pita**, el Rio de Janeiro, kies partopreno ebligis la aperon de tiu ĉi libro per Projekto Kelter.

Profitu la legadon!
KCE - estraro
05/08/1999

Kultura Centro de Esperanto

C.P. 1097, Campinas, SP
BRAZILIO – BR-13012-970

kultura@esperanto.cc
<http://www.esperanto.cc>

Kiu estas Arthur Azevedo?

Arthur Azevedo naskiĝis la 7-an de Julio 1855 en São Luís do Maranhão kaj mortis la 22-an de Oktobro 1908 en Rio-de-Ĵaneiro.

Li estis la plej aplaŭdita, populara kaj multproduktanta brazila teatroverkisto. Nur dekkvinkara, ankoraŭ en sia naskiĝurbo, li verkis la spritan komedion *Amo per Proverboj*, kiu estas prezentita la unuan fojon en la teatro S. Luís kaj tuj altiris la atenton de la publiko.

Tiu ĉi tre interesa kaj sprita komedio jam havis multajn centojn da sukcesaj prezentadoj en Brazilo kaj Portugalujo. Poste li transloĝiĝis al Rio-de-Ĵaneiro, kie li verkis kaj prezentiĝis, ĉiam kun granda sukceso, ĉiujn siajn multenombrajn kaj ĉiuspecajn teatraĵojn.

Jen estas liaj teatroverkoj pli preferataj de la publiko: *La Doto*, grandvalora supera komedio; *La Juvelo*, belega versa komedio; *La Orakolo*, *Antaŭtago de l trireĝa Festo en Bahia*, *La Federala Ĉefurbo*, kaj multaj aliaj.

Li ĉiam batalis por la Nacia Teatro. Li estis vigla ĵurnalisto, la plej tiama kompetenta literatura kaj teatra kritikisto, ĉarmega fabelisto kaj, super ĉio, peto kun forta humorista inklino, kaj unu el la plej inspirataj kaj delikataj brazilaj lirikistoj.

En 1895 li publikigis en la ĵurnalo *O Paiz* artikolon por Esperanto kaj ĝis sia morto li ĉiam montris simpatian al tiu ĉi internacia lingvo.

En tiu-ĉi traduko mi uzis, kiam eble, proverbojn el *Proverbaro Esperanta*, de D-ro L.L. Zamenhof.

A. Couto Fernandes, la tradukinto - Decembro 1920

Amo per proverboj!

Unuakta Komedio

Personaro:

Izaio, *maljuna fraŭlo;*

Agneso, *vidvino;*

Leteristo.

Akto Sola

La sceno okazas en Lisbono.

Simpla ĉambro, Maldekstre fenestro, funde kaj dekstre pordoj. Maldekstre tablo kun kudraĵoj. Sur alia tablo horloĝo, pelo aŭ telero kun glaso da akvo. Seĝoj.

Sceno Unua

Agneso

AGNESO: *(kudras sidante ĉe l tablo kaj rigardas la straton tra la fenestro):* Jen staras ĉe l angulo la proverbomaniulo! Mi tute ne povas liberiĝi de tiu tedegulo! Nu, mi, vidvino, kaj krom tio, kun promeso pri edziniĝo, povus akcepti kiel tiun maljunulon! Tute ne! Kaj neniuj forigas lin de tie! Tio estos motivo por ke la najbaroj klaĉu... *(stariĝas)* Ankoraŭ hodiaŭ li skribis al mi leteron, kiu estas la tria, en kiu li parolas al mi pri amo kaj la dua, per kiu li petas min je edziniĝo. *(elprenas leteron el la poŝo).* Jen ĝi estas *(legas)*. Mia bela sinjorino. Mi estimas ke tiuj ĉi linioj trovos vin en la ĝuo de la plej perfekta sano. Mi fartas laŭ la volo de Dio. Preferinde tiel ol entombigita. Mi venas duafoje peti vin kiel edzinon. Mi opinias, ke mi tute ne estas malbonaĵo. neniam mi

sentis por alia, kion mi sentas por vi; sed ĉio havas komencon. Mi havas monon en banko; ĝi ne estas multa, estas vere, sed pli bona io, ol nenio, kaj Dio donis buŝon, Dio donos manĝon . *(deklamante)* Kiom da proverboj! Sama li estas parolante! *(daŭrigante la legadon)* Al neniuj mi ŝuldas, kaj kiu ne ŝuldas, tiu ne timas. Mi havas bonan domon kaj bonan manĝon, kaj kie umu mangâs, ankaŭ du manĝi povas. Hodiaŭ mem mi iros sciiĝi pri la respondo. Tute via, Izaio . *(enpoŝigante la leteron)* Vi estas en malbona situacio, sinjoro Izaio! Mi devas eliri por fari aĉetaĵojn: tio estas bonega rimedo por liberiĝi min de vi kaj de viaj proverboj. Mi tuj vestiĝos. *(eliras tra la dekstra pordo. Paŭzo)*

Sceno Dua

Izaio

IZAIO: *(metante singarde la kapon tra la funda pordo):*

Malfermita kelo tentas al ŝtelo. *(antaŭenirante piedpinte)* Okazo faras ŝteliston. Mi bezonas lerni la karakteron de tiu ĉi virino; edziĝo tro momenta estas longapenta. Du samspeculoj ne ligiĝas; se la junulino ne estos perfekta, al mi ŝi ne konvenos. Estas necese rigardo estonten: kiu ne rigardas antaŭen, tiu restas malantaŭe; kiu supren kraĉon ĵetas, sian barbon al ĝi submetas, kaj ĉiu manĝas, kiel li aranĝas. Mi decidis edziĝi, sed mi bone scias ke edziĝo ne estas amuziĝo. Iu diros ke mi decidis iom malfrue, sed estas pli bone malfrue, ol neniam. Estas vere ke horo matena esta horo bona kaj matena horo estas plena de oro; sed la trofrua vekigo ne ĉiam estas feliĉiga. Mi serĉis virinon, kiel oni serĉas oron. Ĉiam malfeliĉa! Mi vidis ĉiuspecajn virinojn: belajn, ke mi vere miriĝis; sed... ne ĉio brilanta estas diamanto; ankaŭ malbelajn, ke mi sentis abomenon; sed la sorto ofte ĝin alsendas, de kie oni ne atendas. Hako post hako estas la plej efika atako, mi diris al mi mem, kaj subite... unu, du, tri, kvar, kaj finita la far ; ĉi tiu plaĉis al mi. Tamen oni atentu ke neniu fiŝeto eliris el mia reto; ŝi estas vidvino kaj kudristino... Mi amas ŝin varmege kaj mi kredas ke la afero estas aranĝita. Kiu jam donis, tiu ne

havas por doni, estas vere; sed, nu! kiu tro multe deziras, nenion akiras. Mi jam ricevis informojn pro ŝi; ili estas kiel eble plej bonaj, sed, ĉar la scio lokon ne okupas kaj unu vido taŭgas pli ol dek aŭdoj, mi atente observis ŝin. Mi estas kiel Sankta Tomaso: vidi por kredi. Mi rimarkis ke ŝi ĉiam soliras... kaj ŝi ne ŝatas la festenojn! Kun kiu vi festas, tia vie stas. (esplorante la domon) Bona dommastrino ŝi ŝajnas esti! Pureco kaj simpleco. Faro farinton rekomendas. Okazos kiel plaĉos al Dio. Edzo kaj edzino ĉiela difino. *(rigardante)* Aj! Jen ŝi venas. *(rektiĝante)* Kuraĝu, Izaio! Memoru ke homo... *(konfuziĝante)* estas kato kaj besto estas homo! Mi diris malsagaĵon.

Sceno Tria

Izaio kaj Agneso

AGNESO: *(venas preta por eliri, ekvidanta Izaion si ektimas kaj volas forkuri)* Aj!

IZAIO: *(ne permesante sian eliron)* Neniu devas kuri sen motivo.

AGNESO: Kion vi volas ĉi tie?

IZAIO: Mi venis persone ekscii pri la respondo al mia letero: ne fidu fidelulon; fidu propran okulon; kiu ne riskas, tiu ne gajnas; kiu sin gardas...

AGNESO: *(eksilentigante lin)* Neniam respondon mi havas por doni al vi! Foriru, sinjoro!

IZAIO: Ne estas letero sen respondo...

AGNESO: *(alkurante al la tablo kaj kunportante glason da akvo)* Foriru, se ne...

IZAIO: *(kvietege)* Se vi malsekigos vin, pli da tempo mi restos ĉe vi; malseka mi ne eliros al la strato. He! He! kiu havas malican celon, ofte perdas sian propran felon!...

AGNESO: Mi krias!

IZAIO: Ne faru tion! Ne estu malsaĝa, ĉar la malsaĝulo al mem malutilas. Ne pereigu vian

bonan famon! Atentu ke mi estas knabo; al knabo nenio estas difektiga...

AGNESO.: Knabo, vi?! Vi estas maljunulo tre malsaĝa kaj tre impertinenta!

IZAIO: La diablo ne estas tiel malbela kiel oni lin pentras...

AGNESO: Vi estas malbela, jes!...

IZAIO: Ne belas estas amata, sed amata estas bela.

AGNESO: Ami vin, mi?! Neniam!...

IZAIO: Pri nenio oni devas ĵuri..

AGNESO: Estas abomeninde! Diable!

IZAIO: Eĉ guto malgranda, konstante frapante traboras...

AGNESO: Naŭza!

IZAIO: Espero kaj pacienco kondukas al potenco.

AGNESO: Seniluziiĝu!

IZAIO: Homo pafas, Dio trafas!

AGNESO: Estas iu, kiu vere amas min.

- IZAIO:** Tiu iu (*malafekte*) estas mi.
- AGNESO:** Mankis nur tio! (*sopirante*) Tiu iu...
- IZAIO:** Novaĵo disanoncita, novaĵo trograndigita.
- AGNESO:** Tiu iu estas junulo tiel bela... tiel bonkondata...
- IZAIO:** Kio mia, tio bona...
- AGNESO:** Vi vere kontrastas kun li.
- IZAIO:** Kiu malŝatas, tiu volas aĉeti.
- AGNESO:** Aĉeti! Viron tiel malbelan.
- IZAIO:** Korpo malbela, sed animo bela.
- AGNESO:** (*sidiĝante*) Ha! Ĉu vi sidiĝas? Vi intencas restadi! Dio mia, tio ĉi estas malbono enirinta tra la pordo!
- IZAIO:** (*ĉiam flegma*) En ĉiu malbonos estas iom da bono.
- AGNESO:** Jen vi havas!
- IZAIO:** Sidiĝu ĉe mia flanko. (*Vidante ke Agneso sidiĝas malproksime de li*) Se vi ne venos, mi iros... (*ekproksimigas la seĝon*).
- AGNESO:** Tiel estu! ne vin ĝenu! (*plenumas lian volon*) Ne estas rimedo!
- IZAIO:** (*proksimiĝante sian seĝon*) Kio fariĝis tio ne refariĝos.
- AGNESO:** (*Malproksimigante la sian*) Kion vi deziras pli?
- IZAIO:** Diru al mi: via fianĉo (*faras geston*).
- AGNESO:** Mi ne komprenas.
- IZAIO:** Saĝa kapo duonvorton komprenas...
- AGNESO:** Sed nek duonvorton vi diris!
- IZAIO:** Mi demandas al vi ĉu... li havas monon...
- AGNESO:** Kiel?
- IZAIO:** Nu! Surdulo ne interparolas!
- AGNESO:** Sed, kial vi faris tian demandon?
- IZAIO:** (*malafekte*) Kiu demandas, tiu scivolas.
- AGNESO:** Nu!
- IZAIO:** (*sentence*) Du sakoj malplenaj sin rekte ne tenas.
- AGNESO:** Tiu teorio multe similas al vi.
- IZAIO:** Kial?
- AGNESO:** Tial ke ĝi ankaŭ kadukiĝis.
- IZAIO:** (*ofendita*) Do mi jam kadukiĝis, junulino? Tio estas mensogo.
- AGNESO:** Tio estas vero.
- IZAIO:** Ne estas.

AGNESO: Estas.

IZAIO: Se estas tiel, memoru, ke ne ĉiujn veron oni devas diri.

AGNESO: Ha! Ĉu vi koleriĝas? Vi estas kulpa. Kial vi diris al mi malsaĝaĵojn? (*stariĝas*).

IZAIO: (*interrompante sinam promenadon, solene*) En malsata familio mankas harmonio!

AGNESO: Nu! Ni estas ankoraŭ tre junaj!

IZAIO: Kiu? Ni?

AGNESO: (*malbonhumore*) Mi ne parolas pri vi, sed pri li.

IZAIO: Ha! Vi parolas pri li...

AGNESO: Ni laboros unu por la alia...

IZAIO: Estas bone, jes, al laboremulo Dio helpas.

AGNESO: Kaj ne supozu ke, kvankam li estas malriĉa, mia fianĉo ne faros al mi belajn donacojn.

IZAIO: Jes! Kiu kaprinon ne havas kaj kapridojn vendas...

AGNESO: Ĉu vi insultas lin?

IZAIO: Kiam oni diras ke la hundo estas rabia... Kial mi insultus lin, sinjorino?

AGNESO: Se vi silentus...

IZAIO: Jes, sinjorino, en fermitan buŝon ne eniras muŝo... sed via estonteco tre interesas min...

AGNESO: Danke (*sidigas*).

IZAIO: Ne dankinde. Kvankam mi ne estas iu Matuzalemo, mi povas doni al vi konsilojn. Aŭdu min: kiu min avertas, mia amiko estas; kiu serĉas bonan arbon, tiu ĝuos bonan ombron.

AGNESO: Ĝuste pro tio, ke vi povas doni al mi konsiklojn, mi ne volas vin kiel edzon.

IZAIO: Se mi estus juna, vi ne akceptus mi pro tio ke mi bezonus ilin ricevi. Prave aŭ malprave, ĉiam kulpa.

AGNESO: Mi ne deziras denove vidviniĝi...

IZAIO: Vazo rompita longe sin tenas...

AGNESO: Seniluziiĝu, sinjoro: ne estas viaj proverboj, kiuj ŝanĝiĝos mian decidon! (*promenas*) Ho!

IZAIO: (*akompanante ŝin*) Eble ili faros tion, eble!... guto post guto disfalas granito... kiu iras trankvile, iras facile... (*Agneso sin turnas; ili haltas unu kontraŭ la alia*) Junulino, pli bone sola, ol malbone akompanata... Atentu ke la plej blinda estas tiu, kiu ne volas vidi...

AGNESO: (*al si mem*) Mi tuj diros al li mensogaĵojn. (*laŭte*) Tamen se mankus tiu ĉi fianĉo, estas aliaj knaboj, kiuj min aimndumis.

IZAIO: Kio pasis, nin forlasis!

AGNESO: Kaj inter ili...

IZAIO: Kio pasis, ne revenos!

AGNESO: Ne interrompu min!... Kaj inter ili estas riĉulo, kiu iam...

IZAIO: La tempo pasinta neniam revenos!

AGNESO: Ne interrompu min, mi jam diris! Kaj inter ili estas riĉulo, kiu iam forĝesis la promeson...

IZAIO: Fianĉiĝis por ĉiam ligiĝis. Vorto donita estas kiel leĝo!

AGNESO: Aj, malbonulo!... forĝesis la promeson al mi faritan, sed nun li estas aliafoje enamiĝinta...

IZAIO: Unufoje ŝtelinta restos ĉiam ŝtelisto. (*movo de Agneso*) Kaj kiu estas tiu riĉulo?

AGNESO: Tio estas sekreto.

IZAIO: Virino scias tuta mondo scias. Sed vi bone agas: la sekreto estas la animo de l negoco...

AGNESO: Vi havas en la kao fabrikejon de proverboj! For!

IZAIO: Kio abundas, ne malutilas.

AGNESO: Bone! Pri tedaĵo sufiĉas. Alilokiĝu!

IZAIO: Estas la teditoj kiuj alilokiĝas.

AGNESO: Sed mi estas hejme, sinjoro! Diable! kia senhontulo!

IZAIO: (*ekzamenante senhontege la kudraĵon*) Kiu hontas nenion, ne timas Dion.

AGNESO: Se mia fianĉo vidus vin tie ĉi! li, kiu ĵuris mortigi la unuan konkuranton, kiu...

IZAIO: Kiu multe minacas, ne estas danĝera; kiu bojas, ne mordas... Kaj mi estas viro!... mi havas forton... kaj, kie regas la forto, tie rajto silentas!...

AGNESO: (*ironie*) Nu, bonvolu ne malhelpi tiun kompatindan junulon, ĉu jes?

IZAIO: Mi lin malhelpos!... Batu malbonulon, li vin flatos kisu, li vin batos. ĉu vi kredas, ke mi ne parolas serioze? ia afero estas vidi kaj alia...

AGNESO: (*samtone*) Ne, ne faru tion.

IZAIO: Mi faros! Tio ĉi estas tiel certa, kiel duoble du kvar. Tio estas certaĵo. Kiu lupro ne volas esti, ĝian felon ne devas vesti!

AGNESO: Sed, ĉu vi scias ke li estas brava?

IZAIO: Mi ankaŭ estas tia! Tie ĉi malbone, tie nebone! Ne taŭgas du ursoj por unu nesto kaj en unu sako du katoj, ĉiam mordas kaj gratas!

AGNESO: Foriru sinjoro, mi bezonas eliri; mi havas laboron for de tie ĉi.

IZAIO: Kaj mi havas laboron tie ĉi. Mi devas profiti la okazon, ĉar se elsaltas la okazo, ĝi rompiĝas kiel vazo. (*paŭzo*) Rigardu, sinjorino, rigardu atente min kaj diru, ĉu vi trovas min malbela: ĉu ne?

AGNESO: Aj, aj, aj!...

IZAIO: Mi ankaŭ min trovas tia kaj feliĉa estasla malsanulo sinkonanta. Sed ofte ŝajno trompas kaj kapuĉo monaĥon ne faras. Provu kaj vi vidos. (*petegante*). Edziniĝu kun mi.

AGNESO: Dio antaŭgardu min je tio!

IZAIO: Ho! Se ni estus geedzetoj, la afero estus malsama. Ekzemple: anstataŭ eliri nun al la strato kun tiu birdmortiga suno,

AGNESO: (*imitante lin*) Vian edzeton... (*al si mem*) Ho! Kia ideo! Mi min liberigos de li. (*laŭte*) Tamen, ĉar ni ne estas geedzoj, ĉu vi povus fari al mi malgrandan servon?

IZAIO: Tio dependas de la servo: parolu klare.

AGNESO: ĉu vi povus aĉeti por mi tri metrojn da krepo? Rigardu... jen estas la specimeno... en la magazeno de s ro Godinjo... ĉu vi scias kie ĝi staras?

IZAIO: Mi scias; sed eĉ se mi ne sciis! Kiu havas buŝon, tiu iras Romen.

AGNESO: Ĉu vi estas ĝenata?

IZAIO: Ne, por amiko komplezo neniam estas tro peza.

AGNESO: Jen estas la mono.

IZAIO: Ne...ne estas necese... (*ekeliras kaj haltas*) Diable, mi ne memoras ĝustatempan proverbon (*eliras*).

AGNESO: Vi estas en granda embaraso... Kiam vi revenos, vi trovos la pordon fermita. For ! Kia tedaĵo! Nun ni eliru, ĉar jam pasis la horo.
(aperas ĉe l pordo leteristo).

Sceno Kvina

Agneso kaj la Leteristo

LETERISTO: Bonan tagon, sinjorino.

AGNESO: Bonan tagon. Kion vi deziras?

LETERISTO: Jen estas letero...

AGNESO: Letero? (*ricevanta la leteron, al si mem*). De kiu ĝi estas? (*al la leteristo*) Dankon.

LETERISTO: Ne dankinde, sinjorino. Fartu bone.

AGNESO: Adiaŭ (*la leteristo eliras*).

AGNESO: Ha! la litero estas de Felipo... Li, la maldankemulo, bone faris skribinte al mi. De dekdu tagoj ni ne vidas unu la alian... (*malfermas la leteron kaj legas. Fizionomia ludo*):

Agneso. Mi petas pardonon, ĉar mi estas kulpa pro la tempo, kiun vi perdis kun mi. Oni proponis al mi profitegan edziĝon, kaj mi ne sciis rifuzi. Ankoraŭ unufoje pardonon! Mi ne kuraĝas diri al vi ion plian. Post unu semajno mi estos edzo. Forgesu min.

Felipo .

(*deklamante*) Ho! Dio mia! (*relegante*) Jes... jen ĝi estas... tio estas lia litero...(restinte pensema momente) Nu, adiaŭ! Mi vere ne amis lin multe... Mi diras pli: preferinda estas Izaio; li estas pli maljuna, pli saĝa, havas monon en la banko, kaj Felipo ĵus pruvis al mi ke nuntempe mono estas leĝo. Mi atendas tie ĉi Izaion kun mia jeso tute preta! Ho! la mono... kion ĝi faras! (*kantetas ian ajn muzikaĵon*).

Sceno Sepa

Agneso kaj Izaio

IZAIO: (*enirante*) Ofte kantas la buŝo, kiam kantas la koro.

AGNESO: Jen vi jam returne? Vi kuriris!

IZAIO: Ne! Kiu tro rapide saltas, tiu baldaŭ haltas. Mi trovis alian magazenon pli proksime...

AGNESO: (*ricevante la menditaĵon*) Danke. Kiom ĝi kostis?

IZAIO: Bagatelon. Mil ducent rejsojn, ĉiu metro...

AGNESO: Sciu, ke la alia vendas pli malkare.

IZAIO: Kio kostas malmulte, kostas plej kare, sed pli valoras gusto ol mono.

AGNESO: Ĉu vi marĉandis?

IZAIO: Marĉandi! Kial? Pli havas Dio por doni, ol la diablo por vendi.

AGNESO: Mi jam notis ke vi estas tiel malavara pro mono, kiel pri proverboj!

IZAIO: Dio ne ricevis, diablo forlevis. Mi estas ŝparema, sed ne avara. Mi estas tia! Por ĉiu plezuro devas esti mezuro. Mi havas nur unu difekton: mi volas edziĝi. Ĉiu frenezulo havas sian manion. Mi faras al vi je la mila fojo mian peton.

Ne ĉiam estas festo, venos ankaŭ fasto. Vi parolis al mi pri enamiĝinto. Kie li estas? Mi estas tie ĉi, kaj pli valoras tuj ovo, ol poste bovo.

AGNESO: (*al si mem*) Mi devas agi lerte (*laŭte*) Vi... (*kun ideo*) Ha!

IZAIO: Ho!

AGNESO: Ĉu vi jam ĉeestis la ludadon de l komedio *La malbenoj de l kapitano* ?

IZAIO: Ne, sinjorino. De malbenoj mi estas superplena.

AGNESO: Li estis militisto, kiu malbenadis. la junulino, kiun li amis, akceptis kiel edzon, sed nur post kiam li promesis ne malbeni dum duona horo.

IZAIO: Mi parolas pri blanko, vi respndas pri nigro.

AGNESO: Mi tuj parolos pri blanko; mi akceptas vian proponon.

IZAIO: (*torente*) Ĉu vi ĝin akceptas?

AGNESO: Jes, sinjoro.

IZAIO: (*nekredeme*) Mi ne kredas! Kiam la almozo estas granda, la almozulo suspektas.

AGNESO: Sed mi altrudas al vi ankaŭ mian kondiĉon...

IZAIO: Altrudu: ordonas, kiu povas...

AGNESO: Se vi sukcesos resti duonan horon ne...

IZAIO: Ne malbeninte?

AGNESO: Ne! Ne dirinte proverbon! Se vi tion sukcesos, mia mano estas via.

IZAIO: Ĉu vere?

AGNESO: (*sidiĝante*) Vere.

IZAIO: Sed mi povas resti silente, ĉu ne?

AGNESO: Kiel?! Tute ne! Vi devas senĉese paroli!

IZAIO: Tio estas iom malfacila: popola kutimo havas valoron de leĝo.

AGNESO: Aj, vi ellasis unu!

IZAIO: Kion vi volas? Kutimo estas...

AGNESO: Dua naturo, Jam dufoje.

IZAIO: En la tria fojo estas danĝero.

AGNESO: Aj, aj, aj! La afero iras malbone!

IZAIO: Sed ni ankoraŭ ne estis komencintaj. Tiuj estis diritaj intence. Ni komencu! Mi estas en amaso da embaraso!

AGNESO: Alia!

IZAIO: Mi protestas! Mi estas en amaso da embaraso ne estas proverbo. Al ĉiu sinjoro estu lia honoro.

AGNESO: Certe vi malgajnos...Atentu: estas la dua (*montras la horloĝon*). Ĉu vi akceptas la veton? (*paŭzo*) Bone. Silento estas konsento...

IZAIO: Ha! Nun estas vi, kiu ilin diras!

AGNESO: Aj, aj!

IZAIO: Tio estis eraro.

AGNESO: De la eraroj vivas la notarioj... (*paŭzo*) Nu! Diru ion...

IZAIO: Kion mi diros?... nur... ke mi tre amas vin kaj...

AGNESO: Do diru: Longe ĉerpas la kruĉo, ĝis ĝi fine rompiĝas.

IZAIO: Ne provoku min, sinjorino, ne provoku min!

AGNESO: Ĉiu altiras akvon al sia muelilo.

IZAIO: (*sin movetante*) Akvo! Muelilo! Ho! Kia turmento!

AGNESO: Kio okazis al vi, sinjoro!

IZAIO: Nenio... mi havas nenion... estas tiu malpermeso, kiu ĝenas min... Tiu malbenita kutimo... ŝajnas al mi ke mi perdis la saĝon...

AGNESO: Ĉu vi volas ekscii novaĵon?

IZAIO: Mi tuj ĝin ekscios.

AGNESO: Diru kion vi volos! Malfermu la kranon de l sentencoj kaj proverboj... parolu, parolu kion vi volos!

IZAIO: Kaj la kondiĉo?

AGNESO: Ĝi kadukiĝis (donante sian manon) Jen estas: mi estas via.

IZAIO: (*kontente*) Mia! (*alitone*) Kaj la aliaj?

AGNESO: Ili ne ekzistas, neniam ekzistis!

IZAIO: Ĉu mi maldormas? Se mi estas dormanta, lasu in tiel, ne veku min.

AGNESO: Vi tute maldormas.

IZAIO: Ĉu vere? (*eksaltante de plezuro*) Do, vivu Dio! Vivu la plezuro!... Tra la la lara!... (*volas ĉirkaŭpreni sin*).

AGNESO: (*evitante lin*) Haltu! Amo plia kaj malrespekto malplia!

IZAIO: Sklavo kun forta mano... (*alitone*) Ĉu oni povas diri ĉi tiun proverbeton?

AGNESO: Kiom vi volos!

IZAIO: (*finante*)... estas plej forta tirano. (*prenante siajn manojn*) Kaj vi? Ĉu vi amas min, mia anĝelo?

AGNESO: Trankviliĝu: la amo venos poste. Estu bona edzo kaj lasu ke la afero antaŭenmarŝu.

IZAIO: Konsentite! Ne en unu tago elkreskis Kartago.

AGNESO: Kaj ĉiam tre fidu al viaj proverboj.

IZAIO: Estas vere! Okazontaĵo estas fortaĵo! Homo proponas... kaj virino disponas!...

AGNESO: Sufiĉe! Diru adiaŭ al tiuj gesinjoroj kaj ekzorgu pri la edziĝaj paperoj.

IZAIO: Kiu havas buŝon ne.... kantigas. Sed... (*al la publiko*).

IZAIO: La ludo estas farita, Sed antaŭ nia foriro Aŭdiĝos tuj per Agneso El nia kor la deziro.

AGNESO: Finiĝis la komedio, Laboris multe la cerboj, Aplauĝojn viajn ni petas al tiu Am per proverboj .

FINO